

GRUPO ESPERANTISTA
VERDA STELO

DE BOULOGNE-SUR-MER

SEKRETARIEJO
~~82, Strato de Bréquerette, 82~~
BOULOGNE-SUR-MER
FRANCUJO

TELEFONO
0-68

Boulogne-sur-Mer
La 6^{an} de Okt. 1922

Kara samideano mia.

Dankon grandan dankon por via ŝatinda letero de la 24^a de la pasinta + por ĝia enhavo. Kontenta mi estis fine ricevi la menditan adreson.

Mi supozis ke N. Amerika signifas "Unigitaj Ŝtatoj" ĉar "Pa" (Pensilvanio) estas en tiu lando. Mi tuj skribis al tiu stranga Pastro leteron demandante la kaŭzon de lia pli stranga silento.

Kiam mi scios mi supozas ke estos tute + mi ne plu skribos. Sed, mi opinias ke kiam oni ĉesas subite amikan korespondadon, la alia rajtas

noto sur maldekstra margeno:

Mi eraris metante N^ojn sur tiuj folioj, je la 4 + 5. Pardonu.

2

koni la kialon. Same por via landano el Znojmo. Dum kelkaj monatoj li estis entuziasmita + ofte + longe skribas. Dum 3 monatoj li sendis P.K. prokrastante la leterojn pro granda laboro + nun, de 8 monatoj, nenio! Mi tute ne povas al kutimiĝi al tiuj manieroj.

Jes, mi legis poemon de Legrand. Li skribis al mi pri de Helsinki. S^{ino} Z. ankaŭ.

Dankon por via P.K. el Přelouč (Občanská záložna) mi supozas ke la lasta vorto signifas "salono" sed la 1^a (?). Mi ricevis ĝin en Parizo.

Ni revenis la 20^{an} de Sept. + pasigis agrablegan semajnon en Parizo post la belegaj Vosges (montoj en Francujo + Alsaso).

Nun, la vivo iĝas sama. Mia edzo reeniris la Tribunalon (la 2^{an}). Oni faris la ĉiujaran advokatan festenon en hotelo, la saman tagon + nun li laboras multe – tro - febre. Li ankoraŭ preskaŭ same laboris en la du monataj

3

libertempoj ĉar neniam li ŝajnas povi havi libertempon.

Mi jam vizitis Nürenbergon. Bela urbo. Mi ĝojos revidi vin + rekomenci la Kongresajn tagojn. Mi certe ankaŭ revidos Esp. De Mulhouse (Alsaco) kiu akceptis nin la lastan monaton tiel afable. Dank' al ili ni pasigis pli agrable la 4 tagojn kiujn en Mulhouse. Ili, private, invitis nin + estis tute ĝentilaj.

Gratulojn por la vizito de Masaryk. Vi estis fieraj pri tio sendube.

Mi supozas ke Eva estas kuŝata dum li ludas muzikon en via orkestro. Do, via edzino ne povas

amuziĝi kun ĝi¹. Certe ne estas agrable por ŝi kiam vi eliras tiele. Zorgu bone, dum la malvarmoj, pri Eva ke ŝi de nove ne malsaniĝu, la karulino. Efektive, je 14 monatoj, ŝi certe estas tre agrable.

Mi ridetas legante pri la P. Markoj. Ĉu vi vere ne komprenis tion kion mi skribis? Mi petis de vi ĉu vi akceptos P.M. francajn novajn por pagi la leterojn al la Pastro, ĉar mi ne havas P.M. de via lando, ĉar mi ne volis ke vi elzspezu tion por mi, tiele.

Sed diru al mi kiom ĉar mi ne konas la prezon de via poŝto. Vi komprenis uzitajn P.M. + mi certe sendos kelkajn al vi.

Kiel domaĝe ke vi ne plu entuziasmiĝas por, pri + pro Esperanto! Ĉu estas via temperamento? Esp. por mi estas parto de mia estaĵo, de mia vivo. Neniam mi malvarmumiĝos aŭ

4

plivarmumiĝos pri ĝi. Ĝi havas ĉiam la saman valoron + la saman intereson por mi.

Imagu, S^{ro} de tie, vizitis min petante ke mia edzo bonvolu esti la Prezidanto de nova Klubo Idista. Peti tion de ni! Vi povas facile imagi nian respondon.

Esperanto por mi reprezentas mian junecon, kelkajn jarojn + momentojn la plej belajn en mia vivo. Dank' al ĝi, mi travivis fortajn, belajn emociojn, dank' al ĝi mi vizitis multajn landojn, mi posedas bonajn amikojn, mi

5

konis la familion Zamenhof + aliajn amindajn personojn. Dank' al ĝi, mi konis interesaĵojn belegajn. Dank' al ĝi mi superigis mian menson super la ordinara menso de la popoloj. Dank' al ĝi ... sed mi finos aŭ mi skribos ankoraŭ morgaŭ matene

La vorto Rev. (reverendissimus) estas angla vorto: The Reverend Stefan Varzaly. Ĝi signifas pastro protestanta.

Mi ricevis tutan jaron gazeton Bulgaran Esp. + bulgaran sufiĉe interesa. Edzino de juĝisto en Loveĉ korespondas kun mi.

Mi estas malfeliĉa nuntempe pri servistinoj. La mia sanĝas², koleriĝas + certe baldaŭ foriros. Kaj vi ne povas

6

imagi kiel afabla, sindonema + bonkora mi ĉiam estis kun ŝi – ĉar mi deziras ĝardi³ ŝin – sed ŝi freneziĝas mi pensas. Mi, kiu ne estas tre forta ne povas labori la tutan tagon je mastrumado + tiu domo estas tielgranda – ke mi ĉiam timas resti sen servistino. Mi havas alian matene + junulon por la pordo sed nature ne sufiĉas. Kelkafoje mi ŝatus vivi en 3 ĉambroj + neniam plu vidi servistinon en la tuta vivo.

De nove mi vojaĝos – la proksiman semajnon mi iros Londonon + al Birmingham (n. Anglujo) por la edziĝo de mia frato kun ĉarma anglanino.

7

Mi aĉetis, en Parizo, tapiŝon tre malkaran kiu venis de Tchecho-Slovaquie – ne tre delĉa mola, sed tre bela – sed tie, oni ne povas fabriki ilin tiel malkare. Prospera lando ke la via !!

Ĉu vi memoras la ĵurnalojn kiujn mi sendis al vi pri kriminala proceso en "la assises de S^t. Omer" kie Achille Daguebert estis kondamnita esti gilotinata. De post hieraŭ la Prezidanto de la Respubliko, Millerand

¹ Ĉu ŝi? Skriberaro?

² Ĉu skriberaro ?

³ Skriberaro

8

moderigis la punon + li nur faros vivan punlaboron.

Kiel longe oni lasis lin en la malliberejo, estas honte!

Nun, kara korespondanto, mi kuŝiĝos + diras al vi "Dankegon" + Bonan nokton.

Amikan manpremon

Alice Sergeant

la morgaŭan tagon – matene.

Bonan tagon! Mi rimarkas ke mi skribas pli + pli malbone – baldaŭ mi skribos al vi maŝine – ĉu vi volus? Sed, kiel vi kritikos min, ĉu ne?

Adiaŭ – fartu bone + estu feliĉa + neforgesu viajn konatulojn Esp.